ESPERANTISTA NATURKURACISTA ASOCIO

ENA INFORMILO

SOMERO 1987 **N-ro 1**

ENA

Ĉi tiu Asocio estis fondita en 1986. Ĝi ne intencas konkurenci, kvankam ĝi ne estas facile digestebla ĉe multaj. Eble ties kaŭzo kuŝas en la nescio pri kio precize temas. Temas fakte pri la agnosko kaj la intenco disvastigi la NATURMETODAN KURACADON. La celo ne estas flankenmeti la kutiman, ordinaran, kuracsistemon, kvankam oni bone scias ke kelkfoje ordinara drogo, anstataŭ ol kuraci — kaj eĉ kiam ĝi kuracas — okazigas aliajn malsanojn precize kaŭzitajn de la sama farmaciaĵo intencanta kuraci.

La naturmetodaj kuracistoj, estante kontraŭ superemo, favoras toleremon kaj kunekziston. Ilia nura intenco kaj klopodo estas: HELPI LA NATURON KURACI, ne anstataŭigi la naturan laboron.

Manŝele do la celo de ENA estas la jena:

a) interligi fakulojn kaj interesulojn pri naturkuracado kaj interŝanĝi informojn pri la temo;
b) veki intereson pri naturkuracado ĉe Esperantistoj;
c) veki intereson pri Esperanto ĉe tiaj neesperantaj fakuloj.

La Asocio publikigas al novaj membroj sendas ateston kaj membrodiplomon kontraŭ la membrokotizo de almenaŭ unu dolaro(aŭ egalvaloro) pojare.

Estu membro de ENA ne nur naturkuracistoj mem, sed ankaŭ interesuloj kiuj dezirus scipovi kaj malkovri la enhavon de la naturmetoda kuracado. Petante informojn, bv aldoni respondkuponon por la respondo. Bv diskonigi ĉi tiun anoncon-informon. Dankon.

ENA — INFORMILO

estas la organo de Esperantista Naturkuracista Asocio, fondita en 1986. La organo aperas kvar fojoin laŭsezone. La jara kotizo por ENA — aliĝu en iu ajn monato — estas US$ 1:00, kaj nepagipovaj landanoj povas sendi egalvalorajn kiel kotizojn. Membroj rajtas ricevi la organon senpage. La jarabonojn, artikolojn por organo kaj aliajn demandojn akceptas Ĝ. Sekretario Puramo CHOHG, C.P.O. Kesto 3047 aŭ 4258, Seoulo, Koreio.

Prezidanto: D-ro Carmel Mallia
89, Triq is-Santwarju,
Zabbar, MALTA.

Sekretario kaj Kasisto: D-ro Puramo CHONG
C.P.O Kesto 3047
SEOUL 100,
KOREA

Tel: (02) 687-8413 (Kliniko)
(02) 686-7923 (Hejmo)

ENHAVO

3. Flanke de Prezidanto, Grava Anonco
4. Naturaj anstataŭmanĝoj
5. Allium Sativum, Miraklofara kuracilo
6. Skize pri Orienta Medicino
8. Membrolisto de ENA

FLANKE DE

LA PREZIDANTO

Prezidanto de ENA
Carmel Mallia.

Jen la Unua numero de nia Interligilo. Vere modesta afero la nia! Sed kion atendi el tute nova, tute ĵus naskiĝinta faka asocio? Ĉu ne same kiel en la tutunuaj tempoj de Esperanto? Sed ni ne malkuraĝiĝu! Male! Ni klopodu fari nian eblon antaŭen irigi nian novan bebon. Por efektivigi tiun progresigon, ni atendas, almenaŭ de la membroj, kaj speciale de la membroj, helpon ĉiudirekten.

Estas vere, ke ni jam ricevis plurajn vojmontrilojn el diversaj membroj, kies kelkaj ideoj estas adopteblej, aliaj ankoraŭ ne.

Vi, ĉiuj konas la celojn de nia Asocio. Do laŭ ili laboru. Sendu al ni ideojn ne nur pri la Asocio mem, sed ankaŭ pri vi, pri viaj spertoj. Kompreneble, se vi sendos ion elprenitan el libro, ktp., bv indiki la fonton. Aliaĵo. Bv skribi al ni ĉu vi intencas partopreni la jubielan kongreson en Pollando. Tiel ni povas ekde nun prepari taŭgan renkontiĝon.

Mi finas kaj salutas, bondezirante al vi kaj al viaj familianoj ĝojplenan kaj fruktodonan jaron, sed speciale pacan jaron ĉie en la mondo. Fartu bone naturmetode.

GRAVA ANONCO

ENA planas okazigi la unuan kunsidon de gemembroj en Varsovio dum la kongrestagoj de la 72-a Varsovia U.K.
Do partoprenantoj en tiu U.K. el ENA-gemembroj sufiĉe atentu la KONGRESAJN KURIEROJN aŭ AFIŜOJN en la kongresejo por informiĝi pri la loko kaj tempo de la kunsido. Ni bedaŭras, ke pro manko de tempo oni ne povis anticipe sciigi gemembrojn pri la detaloj de nia unua kunsido. – Ĝ. Sekretario.

NATURAJ ANSTATAŬMANĜOJ

Nia interligilo servu ne nur por diskonigi niasocietajn novaĵojn sed ankaŭ por diskongi naturkuracajn metodojn. Modestaskale, sed ne malpli interese. Ni atendas de vi similajn interesaĵojn.

Jen do mia propono al vi:mielo kaj pomcidra vinagro, du mineralplenaj naturmanĝoj.

Unue pri la mielo. Sed antaŭ ol komenci, estas substrekinde, ke en nia sango ekzistas sukero. Ĉirkaŭ unu tekuleron estas la normala kvanto. Se ĉi tiu kvanto malpliiĝas, oni povas senkonsciiĝi; se ĝi pliiĝas, almenaŭ dum iom da tempo, diabeto povas aperi. Patrino Naturo preparis ĉion necesan por glata prospero de nia korpo.

Mielo estas plej bona manĝo aŭ, pli bone, anstataŭmanĝo. Ĝi helpas fermentadon en la gastro-intesta regiono kaj estas rapide ensorbita; ĝi entenas gravajn elementojn por estigi novan sangon; ĝi havas efekton mildelaksetigan, kaj malhelpas mallakson.

Nun, mielon ni flanken metu momente por pritrakti potason. Postaso estas la plej grava mineralo, fakte la ŝlosila mineralo sen kiu nenio povas vivi. Estas vere, ke ĝi troviĝas dise tra la naturo sed neniam sola, ĉar ĝin ĉiam akompanas acido. Potaso havas la povon ŝanĝi semon en floron; sen ĝi, planto flaviĝas kaj mortas. Ĝi eniras legomaron el la tero mem. Do ĝia manko signifas ĉelan malbalancon kaj disturbon ĉu fiziologian ĉu korpokemian. Nesufiĉa kvanto da potaso povas havi la jenajn rezultojn: kalojn ĉe la piedplando, kaphar-perdon, kariiĝintajn dentojn, fingro-ungojn flekseblajn kaj deŝireblajn.

Unu el la funkcioj de potaso estas teni la histojn molaj kaj flekseblaj. Sekve, ĝi malrapidigas la malmoliĝan procezon de la sangotuboj.

Potaso abunde troveblas en pomcidra vinagro, kiun oni povas aĉeti ĉe specialj sanmagazenoj.

Mi nun kombinu la du jam pridiskutitojn: mielon kaj pomacidan vinagron. Jen simpla preskribo por havi la mineralan neceson por la korpo: elprenu du tekulerojn da mielo kaj du tekulerojn da pomcidra vinagro; enmetu ilin en glason da akvo Trinku ĝin. Faru tion unufoje aŭ dufoje potage depende de la mensa kaj fizika laboro. La vinagro transprenas sian mineralon el la pomo kaj la mielo la sian el la flornektario.

Carmel Mallia

Bibliografio: *Folk Medicine* de D.C. jarvis, MD.

Hubert M. SCHWEIZER (FRG)
Goethestr. 16 D-7768 Stockach, FRG

"ALLIUM SATIVUM" - MIRAKLOFARA KURACILO FIODORA

La pola medicinisto prof. d-ro Jerzy Lutomski, direktoro de instituto por esploro de medicinaj plantoj, antaŭ nelonge raportis pri interesa testo ĉe grupoj de laboristoj de plumbofabriko: toksa peza metalo en korpo solviĝis kaj estis elpelita tra la renoj – helpe de ajlo. Laŭ prof. d-ro Jerzy Lutomski respondas pri tio biologie aktivaj sulf-oleaj kombinaĵoj, kiuj krom certaj enzimoj same kiel A-, B1- kaj C-vitaminoj abundas precipe en freŝa ajlo. Jam 3 bulberoj de ajlo ĉiutage sufiĉis: 3-foje ĉiutage maĉu unu bulberon antaŭ manĝado.

Jam en la antikvaj ĉina kaj egipta medicinoj ajlo estis rigardata kiel panaceo. Ajlo estas mondvaste konata en la popola medicino same kiel ĝi estas internacie la malferma sekreto de bongusta kaj saniga kuirarto. Sed en Germanio ajlo estas pro sia odoro iom malŝatata: kuiristo spicu per ĝi nur tiom, kiom ne ebligas, ke oni povas elgustumi ĝian uzon en la preta kuirajo. Aliakaze spirado de gastoj preskaŭ haltas! Ne mirige, ke en Transilvanio ajlo uziĝis laŭdire eĉ por forpeli vampirojn kaj ke ankoraŭ en la pasinta jarcento kuracistoj en Eŭropo tute serioze uzis ĝin kontraŭ vampirismo – kaj kun sukceso kontraŭ konsumiĝo.

Moderna medicino atribuas al ajlo ĉefe antibakterian, antisklerozan kaj anti-karcinomogenan efikojn:

Antibakteria efiko: alicino efikas precipe kontraŭ salmoneloj, koleravibrioj, strepto- kaj stafilokoloj.

Antiskleroza efiko: cistein-sulfoksidoj malaltigas kolesterinan spegulon, purigas kaj elastigas vaskulojn, sekve de tio malaltiĝas arteria tensio – samtempe pro antitromboze efikanta redukto de sanga viskozeco. Ĉelmetabol-aktiva katalizeco de sulfuro ankaŭ klarigas antidepresian efikon de ajlo.

Antikarcinomogena efiko: ĉe musoj oni konstatis selektivan blokadon de karcinomogena kromosomo-dividiĝo, pozitivan mitozo-inhibicion de patologiaj kancerĉeloj!

Fine jen agnoskita, aŭtentike naturkuraca recepto kontraŭ tenioj kaj trikinoj: post matenmanĝo raspu fajne 15 bulberojn de ajlo, post 1 horo prenu 2 supkulerojn da ricinoleo: la parazitoj tutcerte foriros! La vermaj mukozoj ne eltenas amarajojn kaj taninojn, salojn kaj eterajn oleojn. Tial ankaŭ salitaj haringoj, karota dieto, absinta infuzajo kaj salvia lakto helpas (forbulo 1 litron de kaprina lakto kun manpleno da salviaj folioj ĝis duonvaporiĝo, kaj trinku tion gluton post gluto frumatene – maksimuma aktiveco de la intesto estas inter la 7-a kaj 9-a). Nesufiĉa deviviĝo de manĝitaj nutrajoj, restajoj de organizantaj substancoj male donas nutromedion al la parazitoj. Pri tio atentigis precipe Rudolfo Steiner (Ŝtajner), la fondinto de la antropozofia medicino, rekomendante pro tio varian spicadon.

SKIZE PRI ORIENTA MEDICINO

Hodiaŭ, kvankam la moderna medicino plenumis rimarkindan disvolviĝon, la nombroj de malsanuloj tamen eĉ pli multiĝas kaj ankoraŭ abundas ĉie nefacile kuraceblaj malsanoj. Tio estas ĉefe pro la mensa streĉiĝo kaŭzata de komplikiĝinta vivo de modernaj homoj, kaj aliflanke tio montras la fakton, ke la nuna medicino (okcidenta) jam malkovras sian limon.

Diversaj kromefikoj de kemiaj medikamentoj, ŝokoj de Penicilino kaj aliaj antibiotikoj, naskiĝoj de fuŝnaskitaĵoj kaj aliaj drogakcidentoj fariĝas la alarmoj en la publika sano de la homaro.

Do estas nature, ke lastatempe Orienta Medicino estiĝis denove taksata kaj rekonata, ke ĝi havas okulfrapan efikon en refortiga (resaniga) terapio kaj en kelkaj nefacile kuraceblaj (nekuraceblaj) malsanoj. Kaj estas plue gratulinde, ke multaj mondaj kuracistoj malfermante siajn okulojn al la valoro de Orienta Medicino ekis studi kaj esplori la teorion kaj kuracmanieron de la medicino.

Iam antaŭe, diris prof. Ryle en Londona Universitato, "Ekde nuna tempo, la medicino devas sin turni de ĝisnuna mikroskopa medicino al teleskopa medicino". Tio ĉi klare montras, ke dum okcidenta medicino faris okulfrapan prosperon en kirurgiaj operacioj, profilaktiko kaj socia medicina fako, ĝi tamen neglektis la sintetikan kaj totalan flankon.

Okcideuta kaj Orienta medicinoj aparte havas en si bonajn Kaj malbonajn punktojn kun avantaĝoj kaj malavantaĝoj en la kuracado de malsanoj. Do por plej perfekte kuraci kaj elimini l malsanojn, ambaŭ medicinoj devas kunhelpi sur baze de reciproka kunlabordo.

Orienta medicino originis jam antaŭ kelkaj mil jaroj el Ĉina kontinento ĉefe ligite de la civilizacio de Flava Rivero, kaj disvolviĝis en Ĉinio kaj ties najbaraj landoj, Koreio, Japanio.

Ĝi formiĝis dum multaj jarcentoj sur baze de praktikaj spertoj kaj laŭ la procedo de sistemiĝo de protomedicinoj, kiuj spontanee estiĝis en vastaj areoj, ĉefe en ĉina kontinento.

Tamen la merita sistemiĝo de la Orienta Medicino ĉefe formiĝis en la fino de 'Printempa kaj Aŭtuna Militepoko' kaj la ĉefa parto de la Medicino kompletiĝis dum la periodo de 'Chin & Han' (320-350 B.C.).

En Ĉinio, kie la medicino devenis, Ĉinoj ĝin nomas la 'Ĉina medicino' aŭ la 'Nacia medicino'. Kaj aliflanke, Moderna medicino povus esti nomata 'Okcidenta medicino' kiam ĝi kompariĝas kun la Orienta Medicino.

Kuracado de Orienta medicino ĉefe konsistas el preskribo de drogoj, kiuj estas miksataj de radikoj, folioj, tigoj, semoj kaj fruktoj de diversspecaj plantoj. Unu el plej ofte uzataj ingredienroj estas 'Ginsengo', la panaceo per kiu dum longaj centjaroj Koreoj provizadis al Ĉinio kaj aliaj Aziaj landoj. Orientmedicina kuracisto palpas al malsanuloj sur manradiko kaj aŭskultas plandojn por la diagnozo. Ĉefa kirurgia metodo de tiu ĉi tradicia medicino estas 'Akpunkturo'. Laŭ diversaj grafikaĵoj kaj teorioj oni insertas per nadlo aŭ akraj instrumentoj iun punkton de korpo.

Anstataŭ tiu ĉi metodo, oni aplikas varmon en malsano aŭ varman kataplasmon aŭ unu aŭ du konusojn faritajn de muelita artemijio. Tiaj ĉi kirurgiaj metodoj estas iom dolorigaj pro senanestezo.

Sed malgrau ĉio eĉ edukitaj koreoj alvokas al si tiujn ĉi Orientmedicinajn kuracistojn, kiuj kuracas ilin per la metodoj hereditaj dum centjaroj. Antaŭtempe estis, ke koreoj frapis la pordon de moderna hospitalo, nur post ili provis tradiciajn kuracistojn. Sed nun deferenciĝis. Nuntempe multaj homoj serĉas orientmedicanjn kuracistojn nur post ili malsukcesis en kuraciĝo pere de modernaj kuracistoj. Estis en la komenco de 19 jarcento, kiam koreoj nevolonte malfernis siajn pordojn al eksterlanda civilizacio.

Sed post ĝia enkonduko, koreoj multe profitis de la moderna medicino. La unua moderna medicina institucio estis konstruita en Seulo en 1885, kiam holero furiozis en koreio. Koreoj dankis al la nova institucio, ĉar nur antaŭ 100 jaroj la sama espidemio kaŭzis la morton de ĉirkaŭ 370,000 homoj, inklude la'morton de beba princo.

Moderna hospitalo rapide gajnis bonan reputacion, dum Orientmedicinaj klinikoj ŝrumpis relative. Sia tempe orientmedicinaj kuracistoj eĉ ŝajnis en danĝero fariĝi arkaika relikvo, almenaŭ en grandaj urboj.

La licencitaj orientmedicinaj kuracistoj nombris en 1971 nur 3,252, dum modernaj kuracistoj estis 14,951. Sed historio estas cikla procedo.

Kun la komplikiĝo de homa vivo en moderna tempo, ankaŭ malsanoj fariĝis pli kaj pli komplikaj. Moderna medicino malsukcesis kuraci multajn kompleksajn kaj kronikajn malsanojn. En tiu ĉi punkto, oni raportis "miraklan kuraceblon" de epilepsio, kancero, neŭrozo kaj aliaj multaj nekuraceblaj malsanoj, pere de akpunkturo kaj herba medicino. Kvankam ambaŭ Okcidenta kaj Orienta medicina sistemo principe klopodas kuraci homan malsanon, tamen ekzistas diferenco inter ilia respektivaj alproksimiĝoj al la malsanoj.

Dum moderna medicino fidas al laboratoria eksperimento por konkeri malsanojn, Orientmedicina kliniko rigardas homan korpon kiel mikrokosmon. Moderna medicino kuracas afektitan parton, sed samtempe ofte detruas la harmonion de korpa organo. Tre multaj homoj mortas post 'sukcesaj' operacioj. Radiumkuracado detruas vivantajn ĉelojn. Ĥemia medicino havas teruran flankefikon. En herba medicino, fabrikita kombinaĵo kiel medikamento estas ne multe uzata. Oni povas vidi tra montrfenestro peklitajn serpentojn en botelo, remburitajn aligatorojn kaj urson, kaj kornojn de cervoj.

Granda ligna kesto kun multaj malgrandaj tirkestoj estas plena de sekigitaj radikoj, herboj kaj seloj. Sed tiuj 'primitivaj' materialoj ofte kuracas timindajn malsanojn. Do ĉu maltrapide efika herbomedicino estas senhelpa al akutaj malsanoj? Tute ne.

Ĝi povas kuraci ĉiujn intlamajn malsanojn, inklude akutan apendiciton, eĉ kiam apendico estas rompita kaj disvolviĝas al peritoneito.

Orientmedicina kuracisto kuracas encefaliton, intestan tifojdon, kaj ankaŭ multajn aliajn epidemiojn. Estas kvin bazaj metodoj en Orienta medicino por forigi malsanojn for de korpoj; pacientojn 1) ŝvitigi 2) vomigi 3) evakui, aŭ 4) kontraŭagi venenon en korpo kaj 5) stimuli varmon en korpo. Kvankam multaj pensas, ke Orienta medicino estas ne malbonefikhava, tio tamen estas danĝera ideo. Herba medicino ankaŭ devas esti atente pritraktata de taŭga kuracisto laŭ la kompleksio de pacineto. Sama medicinaĵo povas esti bonefika por iu homo, sed por alia, fatala veneno. Tial, scii la korpan konstitucion de paciento estas ekstreme grave en administrado de konvena medicino. Ekzemple, modernaj kuracistoj ordinare uzas 'Pas' aŭ 'Isoniazid'kaj aliajn por ĉiuj tuberkulozaj pacientoj.

Sed en Orienta medicino, unu el kvin diferencaj tuberkulozaj medicinaĵoj estas uzataj laŭ la individuaj simptomoj de pacientoj, de lia kompleksio kaj grado de malsano. Eĉ pli grava ol tio ĉi estas la spirito. Ĉar la spirito kontrolas vivon. En Orienta medicino, tial, ambaŭ korpo kaj spirito estas konsiderataj en kuracado de malsano, kaj sep emocioj (ĝojo, kolero, malĝojo, plezuro, amo kaj malamo kaj deziro), se unu el ili malbalanciĝas, povas kaŭzi malsanon. Ĉar la kontrolo kaj balanco por ĉiu tipo de persono kaj por ĉiu kombino de forto en li kaj la rilato kun medio estas diferenca, la medicinaĵo preskrivita por donita simptomo estus ne sama por iu du homoj. Ĉiu homo estas unika kaj la medicinaĵo preskribita por iu individuo devas esti aparte farata laŭ lia individueco.

Membrolisto de ENA

(Ĝis la 20-a de Junio '87)

1. s-ro Vilĉjo Simcock el Britujo, Vegetarano, sek. 'TEVA'.
2. s-ro Bosil jko Pejinovic el Jugoslavio, kuracherboj, instalisto, 26 jara.
3. s-ino Gertrud Weigelt el Svisujo, vegetarino, 74 ja.
4. s-ino Josifa Rabino el Izraelo, diplomita flegistino, 59 ja.
5. f-ino Olive Robotham el Anglujo, vegetarino, 85 ja.
6. d-ro Manoel Blaz Garcia el Brazilo, homeopato, 57 ja.
7. d-ro Puramo CHONG el Koreio, Orient-medicina kuracisto, 35 ja.
8. s-ro Christopher Fettes el Dublino, vegetarano
9. s-ro Ildo Conti el Italujo, universitata studento, konsilisto, 34 ja.
10. s-ro Levar Petar e Jugoslavio, 78 ja.
11. s-ro Karl Nell el Usono, kemiisto, emeritulo, 80 ja.
12. d-ro Carmel Mallia el Mallto, doktoro pri natrumetoda kuracado, sanitara inspektoro, 56 ja.
13. Rev. Ronald C. Peries: 4 Sri Vijaya, Colombo 6, Sri lanka.
14. R.C Marble: 309 North Sixth Street, Lompoc, CA 93436-6225, U.S.A.
15. Kees Ruig: Pynenborg straat 1,6561 EV-Goesbeek, Nederland
16. Joachim Werdin: Pionierow 6/A/9 47220 Kedzierzyn-Kòzle, Polland
17. d-ro Peĉo Vlaĥov: Lenin-XXV-31 5500 Loveĉ, Bulgario
18. Abderrazak Tabka: rue Bizerte 72 M'Saken, Tunizia.
19. Zbigniew Czupkallo: PL 24-220 Niedrzwica Duża, Polando
20. Tamas Andrassy: Jaszbereny pf. 5. -H 5101, Hungario
21. d-ro Ivan liev Carnaev: Sliven, ul. Asenovska 9, Bulgario 8800.
22. Katalin Balogh: Mester u. 34 fsz. 2, Budapest IX, Hungario.
23. prof-ro D-ro Godwin L-Oboh: Esperanta Hospitalo, Universitato de Ukpoma, Ileh, Ekpoma, Bendel INA, Nigeria
24. W. Schulz: PSF 139, Matmitz, GDR 2851, East Germany
25. Stawomir Ruszklewicz: Str Kossaka 19/6; 67-100 Nowa Sol, Polando
26. s-ro Hubert Schweizer: D-7768 Stockach, Hauptstr. 26, Germany
27. S-ino Roan Orloff Stone: Desert Rose Mobile Home Park 2500 East Aztec. #35 Gallup, New Mexico 87301 USA.
28. s-ino Janny Nikolov-Hoitsma: van Goyenlaan 145 3764 XE Soest, Nederland
29. s-ro Kataoka Tadasi: Kôti-si, Kamimatiyon-tyôme 10-3 JAPAN.
30. d-ro Yu rui feng, China-Japan Friendship Hospital, Beijing, China.